


# BEATRIJS

Mezepoka Nederlanda Maria-legendo • tradukita de Gerrit Berveling  
eldonita ankaŭ libroforme: Voĉoj Kristanaj 10  
dua, korektita eldono • Zwolle, 2010 • 48 paĝoj • prezo: 9.00 €

## ENKONDUKO

### 1. La tradukinto



Legu en: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Gerrit\\_Berveling](http://eo.wikipedia.org/wiki/Gerrit_Berveling)

### 2. Frua latina versio

Mallonga formo de l' rakonto de *Beatrijs* jam legeblas en la Latina, kiu ankaŭ ĉi tie sin montras nia Eŭropa *patra* lingvo<sup>1</sup>, nome en ĉapitro 34 de la sepa sekcio de la *Dialogo de la mirakloj* de Cezario de Heinsterbach (*Caesarius de Heinsterbach*, ĉ. 1180 - ĉ. 1240):

---

<sup>1</sup> Vidu pri tiu termino en *Antologio Latina* 9, enkonduke.

## Pri sakristianino Beatrica:

**E**n certa monaĥejo de religiulinoj, kies nomon mi ne scias, antaŭ ne multe da jaroj estis virgulino Beatrica<sup>1</sup> laŭnome. Korpe ŝi estis belega, mense pia, kaj en obeemo al la Di-Patrino plej fervora. Kiel ofte ŝi sukcesis prezenti al Ŝi specialajn preĝojn, ŝi kredis tion pleja feliĉo. Sed kiam ŝi fariĝis sakristianino, ŝi plenumis sian taskon tiel devote, kiel libere.

**C**erta kleriko kiu vidis ŝin, ekdeziris ŝin kaj provis konkeri ŝin. Ŝi malŝatis liajn abundajn dirojn, sed ju pli li insistis, des pli la malnova serpento<sup>2</sup> flamigis ŝian koron, tiel ke la fajron de lia amo ŝi ne plu povis elteni. Alpaŝinte al la altaro de sia patrono, la sankta Virgulino, ŝi diris: Madono, kiel eble plej devote mi servis al Vi, jen mi lasas ĉe Vi viajn ŝlosilojn: la tentojn de la karno mi ne plu povas rezisti.

**Ŝ**i metis la ŝlosilojn sur la altaron kaj kaŝe sekvis sian klerikon. Kiam ĉi mizerulo koruptis ŝin, post kelkaj tagoj li forĵetis ŝin. Sed ĉar ŝi ne havis, per kio vivteni sin, kaj hontis reiri al la monaĥejo, ŝi fariĝis putino.

**K**iam en ĉi peko ŝi pasigis dek kvin jarojn, certatage en ĉi-monda vestaĵo ŝi venis al la pordo de la monaĥejo. Kiam ŝi demandis al la pordisto, ĉu li konas Beatrican, iam sakristianino de tiu klostro, li respondis: Mi konas ŝin tre bone. Estas ja deca sinjorino kaj sankta, kaj sen iu ajn problemo depost junaĝo ĝis ĉi tago ŝi loĝas en ĉi tiu monaĥejo.

**K**iam ĉi vortojn ŝi bone notis sed ne komprenis, subite dum ŝi volis foriri, aperis al ŝi en konata bildo la Patrino de Kompato, kaj diris: Dum dek kvin jaroj en via neĉeesto mi plenumis vian oficon; revenu nun en vian lokon, kaj pentofaru, ĉar neniu el la homoj scias viajn ekscesojn. Ĉar en ŝia aspekto kaj vestaĵo la Di-Patrino plenumis ŝiajn sakristianinajn taskojn. Rapide ŝi eniris <en la monaĥejon>, kaj dum la tuta vivo ŝi dankis Dion, kaj ĉe la konfeso <eldiris kio okazis, kaj per tio ŝi<sup>3</sup>> poste donis ekzemplon.

---

<sup>1</sup> La origina Latina formo de tiu nomo estas *Beatrix*; fakte temas pri la sama kiel la Itala nomo *Beatrice*, konata de Dante, kiu en la Nederlanda Mezepoka epopeeto fariĝis *Beatrijs*. La nomo signifas: *kIU feliĉigas*.

<sup>2</sup> = la diablo.

<sup>3</sup> Teksto ne tute klara.

## 3. La nederlanda versio

### 3.1 Pri la teksto

La Mezepoka Nederlanda Maria-legendo *Beatrijs*<sup>1</sup> konserviĝis al ni en unu pergamena manuskripto, kiu troviĝas en la Reĝa Biblioteko en Hago sub nr 76 E 5 el ĉirkaŭ 1374. Ĝi enhavas en siaj 80 folioj plurajn verkojn; *Beatrijs* troviĝas en la dua duono.

La teksto mem devas datiĝi el la fino de la 13-a jarcento. Multaj ĝin konsideras unu el la ĉefaj verkoj de l' tiutempa Nederlanda literaturo. Tamen dumlonge ĝi apenaŭ estis konsiderata. Ĝi fariĝis iom populara nur post 1841, kiam aperis eldono fare de la retrovinto-literaturfakulo W. J. A. Jonckbloet. Depost la mezo de la 19-a jc ĝi apartenas al la kanono de la Nederlanda literaturo. Depost 1908 *Beatrijs* ankoraŭ pli populariĝis dank' al modern-lingva versio de la fama poeto P. C. Boutens. Lia versio ĝis 1984 aperis en 49 eldonoj.

Por lerneja uzado aperis depost 1916 sufiĉe multe da eldonoj, kutime kun enkonduko kaj vortklarigoj pri la por junuloj plej grandaj enigmoj en la teksto. Herman Teirlinck faris teatraĵon el ĝi, kiu en la sekva jaro 1925 estis bazo de opero de Wille Landré.

Jam en 1870 aperis Germana traduko, en 1909 Angla. Sekvis poste ankoraŭ pluraj novaj Germanaj kaj Anglaj tradukoj; krom tio ekzistas tradukoj en Franca, Afrikansa, Esperanto, Frisa, kaj la dialekto de Bunschoten-Spakenburg kaj Eemdiijk<sup>2</sup>.

### 3.2 Specifaj trajtoj

La aŭtoro de *Beatrijs* ne simple tradukis el la Latina. Lia epopeeto estas tute persona, propraetosa, kaj plurloke li per belaj detaloj scias riĉigi sian rakonton.

#### 3.2.1 Mariologio

Granda ŝanĝo estas la emfazo, kiun li donas al la rolo de Maria kiel Patrino de Dio<sup>3</sup> (ekzemple Maria, kiu Lin nutris, verso 8; Maria, kiu lin mamnutris, versoj 493 kaj 902; Maria, Dinutrinta, verso 1029), kiu decidige influas la okazaĵojn: ŝi instigas *Beatrijs* reiri al la monaĥejo. Kaj en la fino la aŭtoro forte substrekas la kernon de sia Mariologio:

662 Do ne ekzistas tia peko,  
Estrin', ke ĝin ne venkus grac'.

810 "Dio de ĉielo  
kaj ho Maria, Virgulino  
dolĉa, benata ĉiam estu!  
Vi estas virto de l' floraro.  
En via pura virgineco  
Vi portis Idon sen dolor',  
kiu Sinjor' eterne estos.

<sup>1</sup> Pronocu: Béatrix, kun akuta akcento sur e kaj kun longa i.

<sup>2</sup> Multaj faktoj venas el la repaĝaro de la Reĝa Biblioteko Hago.

<sup>3</sup> Por protestantoj tiu emfazo certe sonas troigite kaj ŝoke: foje Mezepoke oni kvazaŭ intermiksas Dion kun Jesuo kaj Maria – sed ja estis por tiamuloj *unu sankta familio*, inter kiuj ni simplaj homoj ne tro klare aŭ akre distingu.

Vi estas elektita: kreis  
 ĉielon, teron, via Filo.  
 De Dio venas tiu povo  
 820 kiun Vi ade povos uzi:  
 Sinjoron, kiu al ni fratas,  
 ordoni povas Panjo Vi,  
 kaj Filin' kara Li Vin nomas.  
 Tre tio trankviligas min:  
 kiu ĉe Vi petas pri graco,  
 ĝin trovas, eĉ se estas tarde.  
 Apogo via ege bonas.  
 Estante trista kaj malgaja  
 (ĉe Vi ja statas tiel ĉi)  
 830 pro Vi mi rajtas esti ĝoja.  
 Kun pravo mi benadas Vin!”

1030 Nun laŭdu Dion. Lin honoru,  
 Marian ankaŭ, Di-nutrintan,  
 kiu miraklon verkis belan.  
 Ŝi savis ŝin el la mizero.  
 Ni ĉiuj preĝu, grandaj, etaj,  
 aŭdante legi ĉi miraklon,  
 por ke Maria por ni estu  
 porpetantino en la valo,  
 kie la mondon juĝos Dio.

Amen

### 3.2.2 Simboleco de ciferoj

Por fari pli ekvilibrantan epopeeton, kiu decas eĉ en la mondo de la Kortega Amo, la aŭtoro ankaŭ ŝanĝis kelkajn detalojn de la origina Latina versio: en la alia versio Beatrijs vivas dek kvin jarojn pekecan vivadon; ĉi tie el tio fariĝas dufoje sep jaroj: unue kun la amanto ŝi vivas sep riĉajn jarojn, poste sep mizerajn jarojn, kun la infanoj sed sen li – eĥo al la antaŭdiroj en Genezo pri la sep riĉaj kaj la sep malriĉaj jaroj (41: 25-31).

Alia nombro klare simbole uzata estas la 3<sup>1</sup> pri la vizioj, kiuj instigas ŝin reiri al sia monaĥejo: se estus nur du vizioj, ili povus veni de la Diablo, kiu ja estas ĉi-monda potenco. Ke estas tri indikas, ke ili venas de Dio.

Efektive, la simbola uzado de ciferoj jam komenciĝas ĉe la unua verso de *Beatrijs*: en la originalo ni tie vidas grandan bele iluminitan literon V<sup>2</sup>. Kaj ĉar Mezepoke en literatura agado ĉiam minimume en la cerbo de verkanto kaj leganto kunrolis la Latina lingvo (ĉiu kiu legi kapablis, ja pasis krom tra la *Vulgato* ankaŭ tra la lernejo de Ovidio, Vergilio, Statio k. s.), tiun V tre facile oni komprenis kiel la Romian ciferon 5.

Mezepoke pluraj ciferoj ja havis simbolajn sencojn; ni menciuj pri: 1 – la Unueco de Dio, la absoluteco plej perfekta; 2 – la Dueco de la kreata mondo, la kontrastoj Dio-homo, viro-virino, homo-besto; sed la 2 ankaŭ povas simboli la diablon; 3 – la Triunuo de Dio; 4 – la konkreta surtera realo: la kvar ventoj, la 4 finoj de la mondo, la 4 sezonoj; 5 – Maria (ŝia nomo ja enhavas kvin literojn!).

<sup>1</sup> Eble konvena loko por memori, ke en la teksto mem plurfoje ciferoj estas montrataj pli malpli laŭ la Latina sistemo: II = 2, V = 5, VII = 7, ktp. Strange impresas tamen la uzado de Vc, kombino de 5 kaj 100 por indiki 500, laŭ Nederlanda prononco pri la cifero.

<sup>2</sup> En la manuskripto la komenca Majusklo montras Marian kun Ŝia filo Jesuo maldekstre, dum dekstre genuiĝas Beatrica.

Do tiamaniere, iom pretere, la tuta poemo *Beatrijs* jam komenciĝas per “MARIA”. La aŭtoro volas speciale honori Marian, kaj faras tion do per 5 versoj: versoj 4-8.

Kaj kiel dirite, la fino substrekas la Mariologion.

### 3.2.3 Simboleco de koloroj

Ankaŭ enestas kolora simboleco: Beatrica forlasas la monaĥejon en sia blanka subvestaĵo kaj ricevas de l’ amanto bluajn vestojn: jen ree simbole pri Maria – blua super blanka ... (verso 272).

### 3.2.4 Aliaj simbolaj detaloj

En la konkretaĵoj de l’ poemo ankaŭ kelkaj detaloj estas iel simbolaj: la eglanterio (sovaĝa rozo) estas simbolo de Amo en la kortega amo de i. a. la trobadoroj, kaj en simila fono ofte renkontiĝas ia “tre plaĉa loko” (*Locus amoenus*) – same kiel en verso 330 k. s.: tia loko ofte rolas en kortegaj amrakontoj. Ke la amatino rifuzas tie – en la libera naturo – ĝui la amon, ne estas simpla prudeco, sed reago laŭ la konvencioj por nobela damo.

## 3.3 Rimarkoj

La rimarkoj, kvazaŭ piednotoj, rilatas la versionumerojn de la teksto. La tekston mem vi trovas en aparta pdf-dosiero en KRISTANAJ FONTOJ.

- 92 la aĝo dek-du-jara > en la manuskripto: la aĝo XII-jara.
- 147 Post ok tagoj > manskribite: post VIII tagoj. Ni dirus: post unu semajno.
- 181 kvincent > La manuskripto mem montras etan c super pli granda V.  
same: 322.
- 374 eĉ mil jarojn > manskribite: eĉ M jarojn.
- 408 naskis du infanojn > manskribite: naskis II infanojn.  
simile: 478, 877.
- 466 dum ĉi dek kvar jaroj > manskribite: dum ĉi XIII jaroj.  
simile: 475, 483, 592, 602, 690, 801.
- 481 la dua sep > manskribite: la dua VII.
- 519 ĝis 524 > Ĉi legendo pri Teofilo kaj lia pakto kun la Diablo estas trovebla en la *Legendaro* de la kanonikino *Rosvita el Gandershejmo* (ĉ. 935 - post 973).
- 644 Jesuo krucumita inter du rabistoj > vidu en *Laŭ Luko* 23:33-43.
- 654 Unu el la du rabistoj ŝajne en la populara rakonto ricevis la nomon Gisemasto.